

LA JUNA VIVO

DUSEMAJNA
ORGANO



POR LA
JUNULARO

Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.

Ĝironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75
Unuobla ekz. f 0.03
duobla ekz. f 0.06
Aliaj landoj: jarabono f 1.00.
(15 Belg. fr. 10 Fr. fr.)

GUUS KAJ LA LUNO.

(de Ida Heiermans)

Iam estis malsana knabo, kies lito staris tuj kontraŭ la fenestro. Tra la vitroj li kaj la luno rigardis unu al la alia, ĉar la knabo ofte nokte ne povis dormi.

„Mi tre enuas”, diris la knabo al la luno. „Ho jes, tion mi povas kredi”, ĝi respondis, „dormi estas pli agrable ol rigardi al mi”.

„He, vi scias tiom multe, kaj vi vidas tiom multe! Aĥ, rakontu al mi ion?” „Sed knabo, mi nur scias historiojn pri infanoj kaj homoj, kiuj ne povas dormi”. „Tiu estas sendube ĉiuj malĝojaj rakontoj?” „Ofte bubeto. Ĉar nokte oni multe rakontas al mi, kion la suno ne povas aŭdi. Ĉar mi vidas la homojn, kiam ili solaj estas kun si mem. Mi legas sur la vizaĝoj tion, kion oni ne povas legi ĉe la sunlumo. Ho knabeto, mi vidas malĝojon, kie la suno kaj la homoj pensas, ke nur estas ĝojo. Multajn mi vidas cerbumi dum la dormo, kiuj dumtage, kiam la suno brilas, faras kvazaŭ ili estas gajaj. Sed mi vidas ankaŭ komikajn aferojn. Jen, en la granda dormejo de la maljunulindomo en via urbo momente ĉiuj virinoj estas plenumovaj, ĉar unu el ili vidis muson, kaj nun ĉiuj tremas pro timo”. „Kia stranga historio!” diris la malsana knabo, „timi museton”. „Aĥ knabeto, strange, strange! Mi nur malmulton opinias stranga. Mi ĉirkaŭrigardas en la tuta urbo, kaj ankoraŭ pli malproksimen. Tion mi jam faras longe. Mi vidas tie, en tre granda domo, knabinon, kiu maldormas. Si morgaŭ iros al balo, kaj ŝi dezirus

surmeti novan, rozkoloran robon, sed ŝi nur havas blankan, kiun ŝi jam dufoje portis! Kaj nun ŝi ĝemas, knabeto Diru al mi vian nomon?" „Bernardo Petro Aŭgusto. Sed oni nomas min ĉiam Guus”.

„Nu Guus, ŝi nur ĝemas kaj turnas sin, kvazaŭ ŝi havas doloron Kaj tie Guus, tie post tiuj dikaj kurtenoj kuŝas korpulenta sinjoro, kaj tiu ne povas dormi, ĉar li manĝis tro multe Kaj ankaŭ la reĝo ne dormas” „He, ĉu la reĝo ankaŭ ne dormas? Kiel strange, luneto? Ĉu li dormas kun la krono sur la kapo?” „Ne Guus. Kaj ĉu vi scias, kial lia reĝa moŝto ne povas dormi? Ĉar la lakeo forgesis meti akvon en la karafon, kaj la reĝo soifas ... Kaj kiam li nun sonorigas, tiam venas la unua ĉambelano, kaj tiu devas averti la duan, kaj la dua la trian, k.t.p. Kaj antaŭ ol la reĝo havas la akvon oni devas vekti la duonan palacon. Kaj tiam daŭros ankoraŭ longe, antaŭ ol la reĝo havas la karafon ... Kaj tial la reĝo turnas kaj turnas sin, rigardas al la malplena karafo kaj treege soifas Nun mi vidas, ke la reĝo ellitiĝas Ho ve, tiu kompatinda reĝo, li ne povas trinki”

„Kiel strange, luneto, reĝo, kiu nokte ne povas dormi pro soifo”

„Kaj ĉu vi konas la instruiston de la granda lernejo, Guus?”

„Ho jes, luneto!” „Ankaŭ li ne povas dormi, ĉar li forgesis, kiom alta estas la plej alta pinto de la Himalajamontaro. Li ankaŭ nun ellitiĝas. En momento li surmetas la ŝuojn kaj en sia ĉemizo li prenas dikan libron kaj serĉas tion, kion li volas scii. Kaj nun li vidas min, Guus. Kaj nun li serĉas, kiom granda estas la ĝusta distanco inter mi kaj la tero”

La kuiristino de la urbestro ankaŭ ne dormas. Ĉar morgaŭ estos festeno, kaj ŝi cerbumas, kiom longe precize devas stari la torto en la forno. Ŝi trovas terure, se la torto estus tro bruna. Ho ve, kiel mi kompatas la dikan Minan. Ŝi varmiĝas pro la pripensado. Ŝi forpuŝas la kovrilojn. Ŝi viŝas la frunton”.

„Ho luneto, kiel volonte mi volus esti en via loko, kaj ĉien rigardi”.

„Por vi estas pli bone resti en via lito, Guus. Mi ne vidas nur komikajn aferojn! Tute ne! Tuj apud via domo estas ĉambreto, kaj tie laboras malriĉa tajloro. La rado flugas kaj la kudriloflugas. Ĉar liaj edzino kaj filo helpas lin. La knabeto estas nur iom pli granda ol vi, Guus. Nu, homoj, iru en la liton! Estas dormtempo. „Mi certe volas”, tiktakas la maŝino, „sed mi ne povas, mi ne

povas. La kostumo morgaŭ devos esti preta” Kaj ili ĉiuj daŭrigas la laboron. De tempo al tempo la virino levas la kapon, ĉar ŝia dorso ege doloras. Kuraĝon, virineto! Kaj tie, Guus, ho ve! Kia malfreŝa ĉambreto! Kaj kiom da homoj dormas en ĝi! Tri infanoj en unu litŝranko. Tri sur la planko. La patro kaj la patrino en la alia litŝranko. Kompatinduloj, dormu kaj songu agrable”.

„Ho luno, kiam mi estos granda kaj forta, tiam vi precize diru al mi, kie loĝas tiuj malriĉuloj. Tiam mi helpos ilin”.

„Bone knabo, faru tion Vi bone helpu Ĉu vi scias, kion mi vidas tie? En la senbrujaj stratoj kuras viro. Li faris ion malbonan, kaj nun li ne kuraĝas rigardi al mi, aŭ al la steloj. Ĉar li bone scias, kion ni diros al li. Mi ofte vidos, ke li ne dormas. Kaj tial maldormi estas la plej malbona” „Tion mi komprenas, luneto”.

„Adiaŭ, fratino!” „He, kiun vi nun salutas?” „Jun, kiun mi tre amas, Guus, ĉar ŝi ofte rigardas al mi. Flegistino. Tute sola ŝi marŝas tra la stratoj. Ŝi iras flegi malsanulon, al kiu oni venigis ŝin. Jen, ŝi aspektas kontenta, ĉar ŝi povas helpi. Kaj ride-tante ŝi rigardas al mi, al mi kaj al la steloj. Tuj ŝi flegos per milda mano la malsanulon. Kaj tie estas alia amiko de mi: la lumgardisto de la turo. Nun li kuraĝe supreniras, nun li estas supre en la turo. Nun li rigardas, ĉu la lumo ankoraŭ brulas, kiu la ŝipojn avertas. Jes, ĝi klare radias. Mejlojn malproksime oni povas vidi la lumon. Kaj la turgardisto staras supre en la turo, kaj aŭskultas la maron, kiu plaŭdas kaj bruas en la malproksimo. Li rigardas al mi, kaj li ĝojas. Ĉar pro liaj zorgoj la ŝipoj estas sekuraj. Bonan nokton, lumgardisto, la lumo radias klare! Bone kaj fidele vi faris vian devon! Nun li povas enlitiĝi, Guus. Kaj trankvile li kuŝos. Lumgardistoj dormas agrable!”

„Mi ankaŭ ofte songas, luneto. Mi songas pri vi, kaj la steloj. Kiam mi estos granda, mi faros belajn objektojn por malgrandaj, malsanaj knaboj, kaj por grandaj, malriĉaj homoj. Mi rakontos al ili tiajn belajn rakontojn, kia via lumo estas, tiel afabla, kaj tiel blua, kaj tiel brila en la senstela nokto. Tiel belaj ankaŭ devas esti miaj rakontoj, tiel belaj”

„Guus, mia knabeto, nun vi komencas songi. Dormu bone, karulo!”

Kaj Guus fermis la okulojn, kaj la luno brilis sur lia pala vizaĝeto.

HISTORIO.

Doktoro Zamenhof kreis esperanton. Li naskiĝis en la jaro 1859 (mil-okcent-kvindek-naŭ) en Bjelostok (Polio). La loĝantaro en tiu urbo konsistis el kvar elementoj: Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj.

La malamikaj rilatoj inter ili turmentis lian animon. Jam kiel infano li revis pri unu neŭtrala lingvo por la tuta homaro. Unue li volis enkonduki unu el la antikvaj lingvoj (latina aŭ greka). Poste li venis al la firma konvinko, ke tio ĉi estas ne-eblo. Tiam venis la ideo pri arta lingvo. Post multa peno li sukcesis konstrui uzeblan lingvon. En la jaro 1887 (mil-okcent-okdek sep) li aperigis la unuan esp. lernolibron en la rusa lingvo.

Marken-Binnen, Nederlando.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Entute mi enskribis 67 kunlaborantojn, el 13 diversaj landoj. El la plej multaj landoj oni ankoraŭ ne povis respondi.
2. La laborkomitato de la internacia esp. asocio por geinstruistoj deziras kunlabori kun ni.
3. Aperis artikoloj pri nia gazeto en „Het Kind” kaj „La Bulgara Esp. Organo”.
4. Ida Heiermans kaj Mevr. Wibaut permesis al ni, traduki la infanrakontojn el iliaj verkoj.
5. Ni ne povas promesi, ke la sekvanta gazeto enhavos 12 paĝojn, tio ĉi dependas de la anoncoj kaj korespondadresoj.

LA FLIKITA PANTALONO.

En nia lernejo estis knabo de malriĉaj gepatroj. Lia pantalone estis tiom multkolora flikita, ke ni ĉiuj havis pri tio plezuron. Kaj ĉiam, kiam ni opiniis, ke li nun ne plu povos uzi ĝin, kaj ricevos novan, jen ree granda, bruna flikaĵo kovras ĝin, kaj ĉiuj aliaj flikaĵetoj ĉirkaŭe ŝajnis rigardi denove kun fido en la estonton.

Post reveno el la ferio estis nia plej festa plezuro inspekti en la lerneja korto la pantalonon de Müller, kaj ni laŭte ridadis ĉar ĝi intertempe fariĝis eĉ pli multkolora.

Hodiaŭ mi hontas pri ĉi tiu ridado. Ni ja ne volis ofendi lin, tamen nia konduto estis treege stulta kaj senpripensa. Ni vidis la multkolorajn flikaĵojn, sed ne tion, kion ili sciigis, kaj tio estas: tuta

mondo de zorganta patrino amo, noktoj maldormaj kaj certe ankaŭ multe da larmoj pri tio, ke la tuta penplena flikado nur rezultigis, ke la filo en la lernejo estas priiridata. Per kiom malmulte da mono la patrino certe devis mastrumi, kaj kiel zorge ŝi certe kudris, por ke la pantalone konserviĝu ĝis en la nova jaro! Kiom milfoje pli valoras ĉi tiu pantalone ol la plej bela angla kun perfektaj faldoj!

Ĉu vi foje aŭdis, ke kelkaj pentristoj en longpasintaj tempoj, kvankam ili parte ne korekte povis desegni, tamen enmetis en siajn bildojn tiom da amo, ke ili ankoraŭ kortuŝas nin, kaj ke oni multfoje pagas cent milojn da markoj por unu tia bildo?

Tia artaĵo estis ankaŭ la pantalone de Müller; kaj hodiaŭ mi pagus por ĝi multe da mono, se ĝi estus aĉetebla kaj sur la tabulo mi pendigus ĝin kiel geografian karton kaj montrus per la montra bastono, kiom da zorgemo estas enlaborita en ĉi tiun mizeran vestaĵon, tiom, ke eĉ la plej perfekta tajloro en Parizo ne povus imiti ĝin, sed devus elvoki: „Tiom da pacienco ne havas tajloro, nek maŝino, tion fari nur povas patrino!”

Bremen, Germanujo.

Elgermanigis H. G.

SARI MAREJS.
(SARIE MARIJS)

MIA SA-RI MAREJS ESTAS FORDE MIA KOR', MI ESPERAS REVI-DI
 ŜIN ĜI LOĜ-IS EN KVARTAL' APUD BE-LA LA RI-VER', A-PU-DE DE LA
 GRAND RI-VER' RE-GVI-DU MIN AL MAL-NOV' TRANSVAL'.
 KIE LOĜ-AS SA-RI NUN. A-PU-DE DE LA MILIS ĈE LA
 VERDA DORING-ARB' TIE LOĜ-AS SA-RI MA-REJS SA-RI MA-REJS

1) Milis = nomo de l' maizkampoj en Transvalo.

2.

Min pelis tim', ke la Khakis ²⁾ kaptus min,
 Kaj kondukus trans maron for.
 Do fuĝis mi laŭ l' rand' de la Upintonŝe Zand ³⁾,
 Laŭlonge de la grand'-river'.

3.

Fine venis liber' kaj okazis reven',
 Reveno al malnov-Transval'.
 Mia kara knabin' estos renkontanta min;
 Ŝia kis' estos mia rekon'.

Āmål, Svedujo.

Esperantigis: BIRGER KARLSSON.

Rimarkoj:

²⁾ Khakis = nomo de la anglaj soldatoj.

³⁾ Uppingtonsche Zand = loko en Transvalo.

CIGANO KAJ LITOVO.

Iam cigano migris kun litovo. Ambaŭ malsatis. La litovo havis porkidon kaj la cigano kokidon. La cigano diris al la litovo: „Nun ni manĝu vian porkidon, poste ni manĝos mian kokidon.”

„Bone!” respondis la litovo.

Ili formanĝis tiun porkidon kaj iris plue.

Denove ili ekmalsatis kaj haltis por ripozi. La cigano komprenis, ke por satigi ilin ambaŭ unu kokido estas tro malgranda kaj li diris al la litovo: „Kion ni manĝetos ĉi tie, sinjoreto! Kokido bongusta objekto, sed ne sufiĉas por satigi du personojn. Ni kuŝiĝu por ripozi kaj tiu, kiu sonĝos pli saĝe, ricevos la kokidon.

„Bone!” diris la litovo.

La cigano kuŝiĝis kaj ekdormis. La litovo ne havis paciencon kaj formanĝis la kokidon de la cigano.

Vekiĝinte, la cigano komencis rakonti sian sonĝon: „Vidu, sinjoreto, tuj kiam mi ekdormis, amaso da anĝeloj malsuprenvenis, prenis kaj forportis min al la ĉielo. Tie Sinjoro Dio sidigis min apud si, demandis al mi, ĉu mi bone sukcesas La Sankta Madono alportis diversajn manĝaĵojn: anasaĵon, anseraĵon kaj multegaj diversajn aliajn! Nur lakto de cikonio ne estis tie. Nu, diru, kion vi sonĝis?”

„Kaj mi,” diris la litovo, „vidis, ke por vi estas tre bone en la ĉielo kaj opiniis, ke vi ne estos malsaĝulo kaj vi ne revenos al ĉi tiu valo de larmoj mi do prenis kaj formanĝis vian tutan kokidon!”

Ĥslaŭzas, Litovio (Lithauen).

El litovaj fabeloj tradukis A. P.

POR KOMENCANTOJ.

LA DANGERAJ BESTOJ.

Muŝo promenis sur la plafono de lerneja ĉambro, kaj aŭskultis, kion la instruisto parolis kun la infanoj.

„Kiuj bestoj estas la plej danĝeraj?” demandis la instruisto.

La infanoj saĝe respondis: „La leonoj, la tigroj, la ursoj”.

Sed kun granda miro zumis la muŝo: „Kiel oni povas diri, ke leonoj, tigroj kaj ursoj estas danĝeraj bestoj! Tute ne! Danĝeraj, vere danĝeraj bestoj estas la hirundoj kaj la araneoj”.

(Trad. el germana legolibro.)

Schatterdorf, Aŭstrio.

J. WIESBÖCK.

1. Traduku la rakonton en vian gepatran lingvon.
2. Post tri tagoj traduku la rakonton en esperanton.
3. Legu kelkfoje la rakonton kaj respondu al la demandoj.

Kie promenis muŝo?

Kie estis la plafono?

Kie parolis la instruisto?

Kun kiu parolis la instruisto?

Kiuj bestoj estas la plej danĝeraj?

Kio promenis sur la plafono?

Kion la instruisto demandis?

Ĉu la infanoj saĝe respondis?


Kion zumis la muŝo?

Ĉu la tigroj kaj la ursoj estas danĝeraj bestoj?

Ĉu la hirundoj kaj la araneoj estas danĝeraj bestoj?

Kial la muŝo zumis, ke la araneoj kaj hirundoj estas danĝeraj bestoj?

Kial la infanoj respondis, ke la tigroj, la leonoj kaj la ursoj estas danĝeraj?



KUNAGADO ESTAS PLI EFIKA OL BATALADO.

Pat kaj Nan estis du azenoj. La mastro kondukis ilin en verdan kampon, ligis ilin per ŝnuro ĉe la koloj, kaj lasis ilin.

Oriente sur la kampo staris fojnamaso; okcidente estis alia fojnamaso. Pat flaris agrablan odoron; Nan ankaŭ. Pat iris orienten, kaj Nan iris okcidenten. Sed meze de la kampo ili devis halti, ĉar la ŝnuro ne estis tre longa. „Venu ĉi tien”, blekis Pat, kaj tiris orienten. „Ne, ne, venu ĉi tien”, respondis Nan, kaj tiris okcidenten.

Ambaŭ tiregis kolere, frapis per hufoj kaj blekis laŭte. Fine ili estis tre lacaj, sed malgraŭ la forta luktado, ili ne atingis la bonodoran manĝaĵon. Vizaĝo al vizaĝo ili sidis ĉirkaŭ la kampomezo kaj ŝvitis.

Pat demande rigardis al Nan. Nan ĝemis, kaj rigardis al la orienta fojnamaso. Ambaŭ ekstaris kaj pace trotis orienten. Ili atingis la fojnon kaj flanko ĉe flanko, avide manĝis ĝin. Entuziasme skuante la vostojn, ili trotis amike okcidenten, kaj pli malrapide formanĝis la duan amason.

London, Anglujo.

EMMA L. OSMOND.



BUURMAN LEERT FIETSEN.

LA NAJBARO LERNAS BICIKLI.

Bonvolu rakonti la enhavon de ĉi tiuj kvar bildoj (rigardu la rakonteton de la azenoj).

La plej bonajn verkaĵojn ni metos en la gazeton.

Dum kvar monatoj ni sendos kvarsemajne al la geamikoj, kiuj liveris la plej bonan rakonton, du premiojn.

Metu sub vian leteron: nomon, adreson kaj aĝon.

El: „T. van den Brink en Th. Lancée, Onze eigen taal”, J. B. Wolters, Groningen-Den Haag-Batavia.



LA UNUA LECIONO.

1. Pomo estas frukto.
2. Piro ankaŭ estas frukto.
3. Banano kaj pomo estas fruktoj.
4. Piro, nukso kaj beroj ankaŭ estas fruktoj.
5. Rozo estas floro.
6. Tulipo ankaŭ estas floro.
7. Violo, tulipo kaj rozo estas floroj.
8. Tablo estas meblo.
9. Bufedo ankaŭ estas meblo.
10. Lampo, tablo kaj forno estas mebloj.
11. Kato estas besto.
12. Hundo ankaŭ estas besto.
13. Porko, kamelo, lupo, elefanto estas bestoj.
14. Kio estas pomo? Pomo estas frukto.
15. Kio estas benko? Benko estas meblo.
16. Kio estas kato kaj hundo? Kato kaj hundo estas bestoj.
17. Kio estas tulipo kaj narciso? Tulipo kaj narciso estas floroj.

- A. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.
- B. Post kelkaj tagoj traduku la frazojn en esperanton.
- C. Respondu al la demandoj:

Kio estas kato?

Kio estas tablo?

Kio estas rozo kaj violo?

Kio ankaŭ estas meblo?

Kio estas banano kaj piro?

Kio estas hundo kaj lupo?

Kio ankaŭ estas fruktoj?

Kio ankaŭ estas bestoj?

Kio estas koko?

Kio estas simio?

Kio estas piro kaj bero?

Kio estas bufedo?

ENHAVO DE TIU ĈI NUMERO.

Guus kaj la luno. — Historio. — Sciigoj pri la gazeto. — La flikita pantalono. — Sari Marejs. — Cigano kaj litovo. — Por komencantoj: La danĝeraj bestoj. — Kunagado estas pli efika ol batalado. — Najbaro lernas bicikli. — Unua leciono.

REKLAMTARIFO:

I paĝo: 20 gld.; ½ paĝo: 11 gld.; ¼ paĝo: 6 gld.; ⅛ paĝo: 3,5 gld.;
1/16 paĝo: 2 gld.

**ALLOGA POR ĈIU INSTRUISTO
KAJ INFANO**

estas

ESPERANTO POR INFANOJ

DE G. GLADSTONE SOLOMON

Unua legolibro, kun multaj amuzaj
ilustraĵoj

Prezo 1 ŝ 6 p., afranko 2 p.

BELA JOE.

Marshall Saunders
(Blaikie kaj Hohlov)

Bindita 3 ŝ 6 p., broŝurita 2 ŝ 6 p.,
afranko 4 p.

Tre interesa rakonto pri
la vivo de hundo.

Mendu ĉe

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO,
142 High Holborn, London, W.C. 1.,
Anglujo.



„FLORETOJ”

Porinfanaj Rakontoj
tradukitaj de la

„VENDREDA KLUBO”
en Winschoten
(Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj
bildoj

de C. Jetses

prezo 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la
eldonisto:

J. B. WOLTERS

Groningen — Den Haag
Batavia.

Gaja Lernolibro de Esperanto kun 120
bildoj. Rekta metodo. Bonhumoraj
bildoj, damandoj kaj respondoj.

Postulu prospekton.

C. WALTER, Berlin W 35.

Graf Speestr. 24.

Prezo R.M. 1,75

aŭ 7 poŝtaj respondkuponoj.

Nepre necesa estas la Kwartetludo por
ekzerci la paroladon. Ĝi estas agrabla
kaj lerniga ludo kun bildoj kaj ĝi
entenas la sufiksojn.

Prezo 50 cendoj, nederlanda mono.

Adreso:

J. L. SLAVENBURG.

Apeldoorn, Holando.

Ĝiro: 26623 aŭ poŝtmandato.

KORESPOND-ADRESOJ:

ĉiu vorto: 0.03 gld.